

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgo
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gilli Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 215
26. 10. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fr. por landoj, kies valuto
sufiĉe malkaŭmas 50%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,08 dol. aŭ 0,25 sv. fr.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de
0,30 sv. fr. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fr.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgo, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La trafiko iama kaj nuntempa.

Ni vivas en la epoko de internacia interkomunikigo, de l' trafiko ĝenerale. Utopio apenaŭ havas bazon. Tio, kio hodiaŭ ne jam ŝajnas esti ebla, morgaŭ estas realaĵo.

Apud la landstratoj, kie iam malrapide kaj pene veturis trajnoj kaj karavanoj por transporti komercaĵojn, hodiaŭ veturadas modernaj fervojoj. Ilia plej nova konkurento estas la moderna sargaŭtomobilo. La iamajn poŝtkurierojn anstataŭas la moderna poŝt-servo, la telefonio, la telegrafo, la radiotelegrafo kaj eĉ la radiotelefonio.

En la aero, kie antaŭe nur moviĝis birdoj, kreiĝas de l' naturo, hodiaŭ veturadas modernaj birdoj — aeroplanoj. Neniu distanco estas malhelpaĵo, kaj la plej nova okazintaĵo de la aerveturado, la transatlantika veturado de Zeppelin-aerŝipo, evidente komencigas epokon, kiu laŭ distanco malpli grandigas la tutan teron.

Kvankam la homaro estas ankoraŭ tiel difekta, kiel montris la mondmilito, ĝiaj helpiloj atingis maksimumon de perfekteco.

Interese estas kompari la iamajn kun la nuntempo. Pro tio ni publikigas hodiaŭ mallongan artikolon pri la unua fervojo de Stephenson en Anglujo kaj donas priskribon de plej moderna fervojo de l' mondo, la „Pensilvania Fervoja Kompanio“.

Rob. Kreuz.

Pri la unua fervojo.

La fervojaj kompanioj en Anglujo projektas festi dum proksima jaro la 100 jaran datrevenon de la unua pasaĝera kaj fervojo en la mondo, kiu ekveturis unue en okt. 1825 de la nordangla urbo Darlington al Stokton, distanco de ĉirkaŭ 38 mejloj.

Relvojoj kaj eĉ tramoj jam ekzistis antaŭ tiu dato.

La fera tramvojo estis konata ĉirkaŭ 50 jaroj antaŭe, sed estis nur uzita en karbo- kaj ŝtonminejoj kaj estis trenita per ĉevaloj.

Vapora lokomotivo estis provita en 1804 en Kimrujo. Sed oni trovis ĝin multe pli kosta ol ĉevalpovo. „Puffing Billy“ („Spireganta Billy“), kiu ankoraŭ ekzistas nun kaj montras tipon de la unua lokomotivo, estis konstruita en 1813 kaj estis uzita por treni karbojn en New-Castle sur Tyne.

La unua maŝino de George Stephenson en 1814 trenis vagonaron de ok sargitaj vagonoj, kiuj pezis 30 tunojn, je rapideco de 4 mejloj po horo. Kiam la ĝenerala fervojo publika inter Stokton kaj Darlington estis sankciigita de la Brita Parlamento en 1821, oni proponis unue bestopovon, sed laŭ konsilo de George Stephenson vapormaŝino estis adoptata.


La linio malfermiĝis por trafiko en septembro 1825 kaj vagonaro kun 34 vagonoj kun ŝarĝo de 90 tunoj estis trenata per unu lokomotivo veturigita de Stephenson mem; surĉevala signalisto antaŭiradis ĝin.

La vagonaro ekmoviĝis antaŭen je rapideco de 10 mejloj hore, kaj atingis rapidecon de 15 mejloj sur favora parto de la linio. Unu monaton poste la kompanio komencis funkciigi tagan pasaĝeran servon.

J. D. A., Liverpool.

La Pensilvania Fervoja Sistemo.

Tiu ĉi granda transporta sistemo ekzistas de post 78 jaroj. Ĝia ĉef-kaj ĝeneral-oficejo troviĝas en Philadelphia, kie Vilhelmo Penn faris sian mondfaman interligon kun la indigenoj. Tie ĉi naskiĝis la Nacio.



Union Station Washington.

Preskaŭ duono de la loĝantaro de Usono troviĝas en teritorio rekte tuŝataj per ĝiaj linioj. Ĝi funkciadas sur distanco de 27 387 mejloj — t.e. sufiĉe por ĉirkaŭumi la teron — servante al 8 el la 10 plej grandaj urboj de Usono. Ĝiaj 4500 stacioj konstante servadas 20 urbojn, ĉiu havanta loĝantaron super 100 000; 150 urbojn kun loĝantaro super 10 000 kaj 263 urbojn kun loĝantaro super 5000. Ĝi ankaŭ havas eksterlandan oficejon en Liverpool, Anglujo.

La Pensilvania fervoja sistemo entenis antaŭe pli ol 600 apartajn korporaciojn, sed ĝis 1922 ĝi malgrandiĝis al 142 kaj hodiaŭ la nombro estas



Pennsylvania Station New York.

69 korporacioj kun aparta identeco, kiuj pro leĝaj kaŭzoj devas esti konservataj.

Oni bezonas 19 horojn por iri de la ĉefurbo al Chicago kaj 20 horojn de New York al Chicago. Tio estas distanco de 856 respektive 907 mejloj.

Ĉar la urbo New York estas konstruita sur insulo, vagonaroj ziras de okcidente tra tunelo sub la Hudson Rivero. Elektraj lokomotivoj estas uzataj en la tunelo. La orientan enirejon oni atingas trans la Hell Gate-Bridge (Inferpordega ponto).

La akcia kapitalo de la kompanio estas \$ 499 265 700 kaj ĝi havas preskaŭ 150 000 akciulojn.

Tiu ĉi „norma fervojo de la mondo“ estis la unua, kiu uzis ŝtalorejn kaj aerbremsojn kaj projektis siajn vagonarojn per la „blokada“ signal-sistemo.

Ĝi estis ankaŭ la unua fervojo konstruita var-kaj personvagonojn tute el ŝtalo.

694 mejloj el la linio estas 4-relaj. 919 mejloj estas 3-relaj kaj 4174 mejloj estas 2-relaj. Ĝi posedas 7617 lokomotivojn, 8248 pasaĝerajn vagonojn, 5119 laborvagonojn kaj 471 diversajn boatojn. Ĝi kutime dungadas ĉirkaŭ 225 000 gevojinojn. Ĝi prizorgas proksimume 7 milionojn da pakajoj po jare. Ĝi transportas 17% de la pasaĝera kaj 11% de la tuta ŝarĝ-trafiko de Usono. Ĝi havas 15% el la pasaĝervagonoj de Usono, 11 1/4% el la ŝarĝvagonoj kaj 13% el la tuta trenpovo de lokomotivoj. Ĝia ŝarĝa servado en 1923 estis 48 792 086 252 tun-mejloj kaj la pasaĝermejlaj atingis la ciferon 6 554 172 088.

Ĝi ricevis 1,06 cendojn por mejlo por ĉiu tuno da ŝarĝo transportita kaj 2,82 cendojn po mejlo por transporto de ĉiu pasaĝero, el kies sumo ili pagas salajrojn, materialojn, impostojn, dividendojn ktp. Dum 1923 iliaj lokomotivoj forbruligis 17 351 383 tunojn da karbo.

Estas du klasoj da pasaĝera veturado. Per pago de ekstra sumo oni povas rezervi sidlokon en „Pullman-vagono“, kiu havas nur 24 seĝojn. Ĉiu sidloko en la norma vagono estas por du personoj kaj ĉiu sidloko ebligas rigardon antaŭen. La „Pullman-sidlokoj“ estas por po du personoj kaj estas turneblaj. En nur unuaklasaj vagonaroj (Pullman) oni trovas barbirojn, vir-kaj virin-servantojn, stenografistojn, banejon kaj aliajn komfortaĵojn.

En la 150 manĝovagonoj uzataj estas servataj ĉirkaŭ 4 milionoj da manĝaĵoj ĉiutage. Ĉiu vagono kostas ĉirkaŭ \$ 28 000 kun plua kosto por tolaĵo, argenta manĝilaro kaj kuir-eja ekipaĵo de \$ 2 700. Ĉiunonate la kompaniaj kuracistoj ekzamenas la korpan staton de la kuiristoj kaj kelneroj; ankaŭ iliaj servolokoj estas esplorataj por konservi la plej bonajn servojn al siaj veturantaj gastoj.

Fundamenta konstruado de la relvojo.

La normala relvoja konstruado estas jena: La fundamento konsistas el tavolo da cindro de 12 coloj (30 cm). Sur ĝi estas metata bedo da rompitaĵa rokeroj en dikeco de 18 coloj (45 cm). Poste 20 unuakvalitaj traboj estas metataj laŭlonge de 33-futa relo (10,06 m) kaj fiksataj en la ŝtonbedo. Sur ĉiu trabo estas ferpeco sur kiu ripozas la ŝtalore, kiu pezas 43 1/2 funtojn (21,03 kg) po futo.

Ŝtala kestvagono.

En 1912 tiu ĉi kompanio ekuzis la unuan ŝtalan kestvagonon. Ĝi estas konata kiel klaso X-25 kaj estas akceptita kiel la norma. La internaj mezuroj estas 40 futoj, 5 coloj en longeco (12,30 m), 8 futoj, 10 coloj en larĝeco (2,70 m), 9 futoj, 1 colo en alteco (2,75 m). Ŝarĝpovo 100 000 funtoj t.e. 45,5 tunoj. Entenpovo estas 2 543 kubfutoj (66,35 kbm).

La vagono mem pezas 49 000 funtojn (22 250 kg).

Union Station en Washington.

Tiu ĉi stacio (vidu bildon) en la ĉefurbo de Usono per dekreto de l' Kongreso estas disponebla al ĉiuj fervojoj tuŝantaj la urbon. Ĝi estas konstruita el blanka granito de l' ŝtato Vermont kaj estas 632 futojn (193 m) longa kaj 210 futojn (73,50 m) larĝa. La ĝenerala atendejo estas 120

futojn (36,50 m) alta kaj oni eniras ĝin tra tri arkajoj 50 futojn (18,50 m) altaj. Ĉi-tiu atendoj estas unu el la plej belaj kaj vastaj en la lando, ĝi mezuras 220 futojn (77 m) en longeco kaj 150 futojn (45,50 m) en larĝeco.

En la orienta flanko (dekstre sur la vidaĵo) troviĝas la ŝtata akceptejo, kiu estas rezervata por la prezidanto de Usono, fremdaj delegitoj aŭ oficialaj vizitantoj.

Promenejo etendiĝas sur la tuta longeco de la stacia nordflanko. Ĝi estas la plej granda ĉambro sub unu tegmento en la mondo, enentanta 29718 kvadrmetrojn. La pordegoj de tiu promenejo kondukas al la tridek tri pasaĝervagonaraj relvojoj, kiuj estas 1200 futojn (420 m) longaj. La tuta spaco estas de la stacio, lokomotivejo, riparejo ktp. uzata 160 akreoj (64,75 hektaroj).

Elektra lokomotivo.

Tiu ĉi elektra lokomotivo (vidu bildon) estis farita en la fervoja konstruejo por uzadi en la Alleghany-montoj. Ĝi funkcias je 11000 voltoj kaj prenas la fluan el la supra ruldato. Ĝi havas kvar motorojn de 1200 ĉevalpovo, donantaj al la lokomotivo kapablon de 4800 ĉevalpovo. La pasaĝera parto de l' vagono estas 72 1/2 futojn (22 m) longa kaj 10 futojn (3,50 m) larĝa. Brems-suoj kontraŭas ĉiun flankon de la puŝradoj. La vagonara kaj lokomotiva bremsoj povas esti funkciigataj sendepende unu de la alia. La tuta longeco estas 76 futoj, 6 koloroj (26,79 m), la tuta radobazo 63 futoj, 11 koloroj (22,50 m). Diametro de puŝradoj 6 futoj (2,10 m). Diametro de aliaj radoj 3 futoj (1,05 m). Pezo de puŝradoj 198 tunoj. Tuta pezo de la lokomotivo estas 87.200 ft. (39.500 t).

Peza fret-lokomotivo.

Ĝi estas por servado de la Alleghany montoj en ŝtato Pensilvanio. (Vidu bildon). Tuta pezo estas ĉirkaŭ 57500 funtoj (250 t). Ĝi povas transiri kurbajojn kun duondiametro de 400 futoj (1220 m). La dua kaj kvara paroj de puŝradoj antaŭe kaj la dua kaj tria paroj malantaŭe ne havas flangojn. La tendro estas farita el ŝtalo kaj havas volumenen de 58605 litroj da akvo kaj 126000 kg da karbo.

Pennsylvania Station New York.

(Kun bildo.)

Ĝi troviĝas inter la 7. kaj 8. avenuoj kaj la 31. kaj 33. stratoj. Ĝi estas konstruita el rozkolora granito de l' ŝtato Massachusetts, ankaŭ el brikoj kaj cemento.

Normala fervoja linio.

(Kun bildo.)

En bildo ni povas montri la 4-fervojan linion laŭlonge de la Juniata-rivero en la proksimeco de Lewistown en la Blue Ridge-montaro.

La bildo donas bonegan imagon pri la grandioza de la tuta fervoja sistemo. Veturado tra tiu ĉi pitoreska montaro estas speciala ĝuo. La bildo ankaŭ montras signal-arkon kun 4 elektraj signaloj.

La rulanta materialo.

1. Normala tutŝtala pasaĝera vagono.

Nia bildo montras la normalan tutŝtalan pasaĝeran vagonon. Ĝi estas enkondukita en 1906.

Ĝia sidloka entenpovo estas 88 personoj. Por nelonga servado oni uzas iomete pli malgrandan tipon.

2. Aliaj ŝtalvagonoj.

Tutŝtalan konstruon oni nun uzas por maŝovagonoj, pasaĝer- kaj material-vagonoj. La norma keŝvagono estas enkondukita de tiu ĉi kompanio en 1912. Ĝiaj mezuroj estas 40 futoj, 5 koloroj longe, 8 futoj 10 koloroj larĝe, 9 futoj 1 koloro alte. Ĝia ŝarĝopovo estas 100000 funtoj.


Mia artikolo evidente provas la rajton, nomi la Pensilvanian Fervojan Sistemon „la norma fervojo de l' mondo“.

Harold W. Kline, Philadelphia, Pa., Usono.

Socia Vivo.

Malpliigo de laborhoroj kaj produktado Brita sperto.

S-o L. J. Cadbury, de la fama fabrikejo de kakao kaj ĉokolado en Bournville, Birmingham,



Fervoja Linio laŭlonge de la Juniata Rivero.

en sciigo citita en Sociaj Informoj, la ĉi-semajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo donas interesajn detalojn pri la efiko sur produktado pro la malpliigo de laborhoroj en tiu establajo. Li disdividas la influojn kontraŭantaj la efikojn de la malpliigo de horoj laŭ tri grupoj:

1. Pliigita klopodo;
2. Pli bona organizo kaj direktado; kaj
3. Maŝina disvolvigo.

Elektante procedojn, en kiuj granda nombro da personoj laboras mane, li donas la jenan tabelon, kiu montras la taksitan pliigon de produktado de 1913, kiam la laborhoroj estas malpliigitaj de 47 al 44 semaine (7 procentoj), al 1923:

Procedo	Generala pliigo laŭ laboristo laŭ horo, 1913-1923
Disdono per veturilo	27%
Kakaoprocedo	47%
Ĉokoladoprocedo	39%
Envolvado de ĉokolado	27%
Ĉokolado (mane)	27%
„ (maŝine)	15%

„La ekzameno de tiuj ciferoj,“ diras s-o Cadbury, „montras tre variajn proporciojn de pliigo je hora produktado, kaj oni hezitus por diri, kio estas la meza pliigo por la tuta establajo. Estas ankaŭ necese enkalkuli iun pliigon de salajroj por ne senpere produktanta laboro, rezulte el pli preciza organizo. Tamen, enkalkulinte tion, mi estas plene konvinkita, ke la tri suprenomita tendencoj superkompensas la malpliigon de laboradoj dum la lastaj dek jaroj.“

Informservo de la Internacia Labora Oficejo.

Scienco.

Biologio.

La rapideco de la muskoloj.

En la meritplena verko de D-o Kahn: „La vivo de la homoj“ ni trovas interesajn dirojn pri la laborkapabloj de niaj muskoloj. La rekordo de la violonisto estas 600 fingromovoj po minuto, tio estas 10 movoj po sekundo. Ankorau pli multe laboras la fortepianisto, kiu ludas la „minutovalson“: li devas dum 60 sekundoj movi per la dekstra mano 740 klavojn. Sed ekzistis jam fortepianistoj, kiuj realigis ĉi tiun laborkvanton dum 35 aŭ 40 sekundoj. Mirindaj antaŭ ĉio estas la movoj de niaj parolmuskoloj: ĉi tie atingas la parlanta homo 1500 movojn po minuto, do 25 po sekundo. Kaj tamen la homo estas multe superata de la ĉambromuŝo, kiu faras dum unu sekundo 350 flugilobatojn, mondrekordo, kiun ne nur niaj plej eminentaj aviadistoj, sed ankaŭ ĉiuj naturoflugistoj, insektoj kaj birdoj, verŝajne ne estas atingantaj.

Heinrich Fahl, Wien.

Literaturo.

Anatole France.

Anatole-François Thibault naskigis dum 1844 en Paris. Anatole France mortis la 13 oktobro 1924 apud Tours. La patro de Anatole-François Thibault, veninta el provinco Anjou, malfermis en

Paris ĉe la kajo Voltaire butikon de renovaj libroj; oni lin intime nomis „Patro France“. En tiu medio vivis la juna Anatole-François, kiu studis ĉe kolegio Stanislas; dekkvinjara li aperigis skizon pri legendo de sanktulino, kiun li subskribis per pseŝidonimo pli malfrue famigitaj poste li studis paleografion ĉe la Arhiva Lernejo („Ecole des Chartes“); sed oni povas aserti, ke li estis ĉefe aŭtodidaktulo, plej multe lerninte en la butik mem de sia patro.

Lia talento ne estis frumatura; legisto ĉe eldonejo, poste bibliotekisto ĉe la Senato, li povis rite vivi en literaturaj medioj: salonoj kaj librojoj. Lia kulturo plidelikatigis, kaj, se oni povis diri: ke Maurice Barres devenis el Roma por sia, tradicione kaj imperiemo, oni povas aserti, ke Anatole France prezentis precipe grekajn karakterojn: subtila, sendependa, individuema, ribelema kontraŭ nejusta kutima ordo, diskutanta pri dioj kaj reĝoj, ne facile trompebla per iluzioj, dubema, . . . skeptika. Kiom oni riproĉis al li tiun skeptikon! Kaj tamen li ĉiam servis idealon: arto, belo, naturo, justo, paco. Malgraŭ siaj virtoj (iafoje juĝitaj: malvirtoj) li estis plej konservema en la verkarto; certe klasika, sed ĉefe ravanta kaj ensorĉanta estas lia stilo, kiu feliĉe influas nunajn verkistojn; li iel savis francan lingvon el malzorgo.

por tre vasta distrikto, ne povas esti sufiĉe preciza por certia loko unuopa.

Fine mi mencias, ke la amatora veterobservado kaj prognozado per nur malmultaj, simplaj instrumentoj, helpate per gvidanta libro, estas tre instrua kaj interesa amuzo. Simile al la fotografa sporto, kiu ofte interrilatiĝas kun la naturo, ankaŭ tiu ĉi observado pri parto de la naturo multe amikigas al ĝi kaj elkas bonfara al spirito kaj animo.

Leono Funken, Koblenz.

El sorĉista laborejo de gardenisto.

La vegetaloj hejmaj en regionoj, kie la somero estas regule sekva de la vintro (dum kiu la varmeo falas sub la nulan punkton), vidigas precizajn, herede fiksitaĵajn akomodigojn al tiu ĉi klimato. Tiuj konsistas en tio, ke la kreskan periodon de la printempo ĝis la aŭtuno sekvas longa periodo de ripozo, kvieto, en kiu la vivigado de la vegetalo grandparte estas limigita kaj haltigita. Tiu ĉi periodo de evoluo estas pli bone videbla ĉe niaj arboj kaj arbetoj kiuj, perdinte foliojn (kaj fondime dum somero burĝonoj por printempo) eniras en kelkmonatan dormon vintran; iuj periodeco konservas obsojne, eĉ se ili estas transportitaj en pezaĵon, kies klimato permesus neinterrompitan kreskon dum la tuta jaro.

Sed la vegetalo ne kondukas al eksteraj influoj egale dum la tuta ripoza tempo. Ne estas tro malalta naturo fenomeno la aŭtuna apero de novaj branĉetoj, eĉ kun folioj kaj floroj, simile kiel apero de burĝonoj post perforta perdo de foliaro (per rajtoj, hajlo) kaj post vundigo. La burĝonoj estis tiukaze en prepara ripozoperiodo, la kreska agado ankoraŭ nefinita, do facile vekelbla por antaŭtempa evoluo per influoj eksteraj aŭ eĉ per nekonataj internaj agantoj.

Post finiĝo de la evoluo kaj translokiĝo de sukaj venas ĉefa ripoza karakteriza per tio, ke eĉ per pli alta temperaturo oni ne povas kaŭzi ĉe ili antaŭtempan ekfloron. En septembro - novembro ekzemple ne ekfloras la burĝonoj de fajgaj branĉetoj defranĉitaj en oktobro kaj simile. Ni vane penadus ekflorigi bone fonditajn kaj jam grandajn florburĝonojn de ĉerizarboj en varma kaj malseka florojo en komenco de oktobro. Estas ĝenerale konate, ke terpomoj (bonaj vintraj varioj) konservataj post rikolto en ĉiam egala temperaturo, ne ĝermas aŭtune kaj vintre, sed printempe ili komencas kreski, kvankam la temperaturo nek la malsekeco de konservejo sangigis.

En aŭtuno.

Nuboj kaj veterprognozo.

Oni povas diferencigi kvar ĉefklasojn de la nuboj: plumonubo (lat. cirrus), bulonubo (cumulus), sironuboj (stratus) kaj pluvonubo (nimbus). Ĉi tiuj klasoj ofte transiras unu en alian, tiel ke ekestas interklasoj, de kiuj oni nombras ses.

Antaŭ ol priparoli la ĉefklasojn, mi volas unue koncize klarigi, kiel nuboj estiĝas. La suno varmigas la tersupraĵon, ĉi tiu la surkuŝantajn aeron. La varmiginta aero estas forigata per alia pli malvarma aero, kiu ja estas pli peza ol tiu, kaj supreniĝas. Ju pli alta ĝi venas, des pli ĝi ekspansias, per kio ĝi samtempe perdas varmon. Tio nun sekvas, ke la aero ne plu povas konservi ĉiun malsekan, kiun ĝi kunportis supren. La malsekaj kondensigas en multegaj malgrandaj gutetoj, kiuj kune formas nubon. Do nuboj efektive estas nenio alia ol nebulo. La estiĝo de nuboj aŭ nebulo estas multe favorata per polveretoj kaj fulgeroj ŝvebantaj en la aero, ĉirkaŭ kiuj la aera malsekajo facile kondensigas, tiel ke la polveretoj formas la kernojn de la gutetoj.

Parolante ĵus pri la nebulo, mi volas pritrakti ĝin unue. Apears du nebulspecoj. La unu ofte montriĝas dum malbona vetero kaj estas nenio alia ol sironuboj, kiuj estiĝinte sur la supraĵo de aertavolo kuŝanta super la tero pli poste malleviĝis. Ĉi tiu nebulo estas facile ekkoncibebla per sia neagraba, mucida odoro. Kontraŭe la „belvetera nebulo“ posedas freŝegan, agrablan odoron. Ĝi formiĝas, se dum klara vetero la aero, kiu tage absorbis multen malsekajn, nokte malvarmiĝas ĝis sub la t.n. „rospunkto“, kie la aermalsekajo kondensigas je nebulo. Kiam matene la suno re brilas, ĝi baldaŭ varmigas la teron kaj suran aertavolon, kiu ekspansias kaj tiel ree povas absorbi la nebulgetojn. Ĉar unue la subaj aertavoloj sennebuligas, oni havas la imagon, ke la nebulo levigas. — Je tia vetero baldaŭ vidigas la blua ĉielo; male la „malbonvetera nebulo“ restadas kutime la tutan tagon.

Ordinare oni ne konsideras la nebulon nubon. La plej altaj inter la efektivaj nuboj estas la plumonuboj, ŝvebantaj 7 ĝis 13 km super la tero. Ili nomo devenas de ilia aspekto. Ili ja estas tre similaj al plumetoj aŭ lanuoj pentritaj sur la bluan firmamenton. Same oni povas kompari ilin al glaciaplatoj sur fenestra vitro. Efektive ili konsistas el malgrandegaj glaciopletetoj, kiuj ĉe la limo de la nuba zono kvazaŭ sur vitra kloŝo sedimentiĝas. Se

dum bela somertago fia sedimento pli kaj pli densiĝanta aperas ĉe la firmamento, tio estas certa simptomo por proksimiĝanta fulmotondro, precipe se ankaŭ la atmosfera premo malpliigas. Plumonuboj venantaj rapide el la pluvodirekto anoncas „minimuvon“, t. e. periodon de malbela vetero. Oni tiukaze povas atendi pluvon antaŭ la preterpaso de 24 horoj.

La duan nuboklason, la bulonubojn, oni plej ofte trovas dum bela vetero. Ili estas karakterizataj per bele rondigitaj, aŭ pli bone, buligitaj formoj. Ili alio estas nur 1 ĝis 4 km Parencaj al ili estas la ĉe ni nomataj „ŝafdonuboj“ (altocumulus), kiuj troviĝas iomete pli alte (3 ĝis 5 km). Ofte oni vidas ilin en multaj vicoj unu apud la alia. Tion rezuligas, ke la ŝafdonuboj — simile al ŝaŭmkronoj de akvoondoj — formiĝas ĉe la supraĵo de aertavolo. Aertavolo superfluvanta estiĝas ondojn, sur kies supra ekestas tiuj nubetoj. Ankaŭ ili estas belveteraj nuboj. Dum ke la bulonuboj troviĝas meze de aertavolo, la sironuboj estiĝas sur la supraĵo de aertavolo. Se la aero estas kvietaj, la sironuboj sedimentiĝas simetrie kiel la plumonubaj valoj; alie farigas malhelaj, nigrebluaj nubostrioj, inter kiuj oni vidas la bluan firmamenton. La sironuboj, kiuj estas altaj malpli ol 1000 m, estas akompanitoj de malbela vetero kaj de fulmotondroj.

La lasta klaso estas la pluvonuboj, t. e. tiuj nuboj, el kiuj jam falas pluvo aŭ neĝo. Ili posedas dispecigitajn randojn, de kiuj ofte grandaj ĉifonoj pendas suben.

La nuboj estas la vizaĝo de l' vetero. Sed same, kiel nur per la vizaĝo de homo oni ne povas ekkoni kun certeco ties karakterojn kaj projektojn, tiel estas ankaŭ rilate la veteron. Estas kamparanoj, ŝafistoj, spististoj, aviadistoj, kiuj estas spertaj veterprofetoj, bazigante siajn prognozojn sur nuboj, vento kaj varmo, konduito de bestoj kaj plantoj. Kaj ju pli da faktoroj ni atentus, des pli verŝajna, des pli certa fariĝas nia antaŭdirado. Tamen por la hejma prognozo la nomitaj jam estas sufiĉe bonaj helpantoj. La venton, alportantan ordinare pluvon, oni certe konas. Ĝi estas aldirekta en diversaj regionoj. Pliiginta varmo estas favora al pluvado. Kiu havas, povas demandi barometron kaj hidrometron, por ekkonsci la aerajn atenton, ke ne ilia staro, sed ilia moviĝo estas grava por la antaŭdirado. T. e. ilia staro nuna rilate al staro antaŭa. La veterarktoj, kiuj estas aboneblaj en multaj landoj, povas plifaciligi la lokan prognozon. Tamen oni ne fidu al la veterarktoj sola, ne observante la lokajn veterojn; ĉar tia karto, ĝenerale montranta la veteron

Kvankam lia lingvo estas tre klara, mi sperte certigas, ke inter la modernaj francaj literaturistoj li estas unu el la plej malfacile tradukebla en Esperanton: kelkpaĝan novelon de Anatole France (la Mistero de la pigo) tradukis antaŭ dekkvar jaroj la Grupo Esperantista de Lyon, sed ĝi ne estas eldonita. Eble pro sia skeptika Anatole France iam aŭdigis pri Esperanto ne tre favoran opinion; ne gravas, liaj ĉefaj verkoj devos esti tradukataj en Esperanton, ĝuste ĉar malfacile tradukeblaj ankaŭ en aliajn lingvojn.

Tiuj ĉefaj havas titolojn: la Krimo de Sylvestre Bonnard, (1879), Thés (1890), la Rostejo je l' reĝino Pédaque, la Opinioj de Jérôme Coignard (1894). Nuntempe Historio (la Ulmo de l' publika promenejo, la Saliketa homŝajnaĵo, la Ametista ringo, sinjoro Bergeret en Paris, 1899—1901), la insulo de l' pingvenoj, la dioj soifas, k. a.

Membro de l' Franca Akademio, ricevinta Nobel-premion por la paco, Anatole France malgraŭ siaj kuracistoj dum lasta somero ĉeestis gloran apoteozon al li dediĉitan de l' franca popolo en la palaco Trocadéro. Nun franca beletristiko funebra: moriis majstro. La mondo kondolencas. L. P. (L.)

La 75-a datreveno de la mort-ago de E. A. Poe (7 okt.)

Nun estas 75 jaroj, ke tiu ĉi eminenta angla-amerika poeto estas savita de sia vivo detruita per malriĉeco, malsaneco kaj drinkemo. Li estis malkutima laŭ la opinio de samtempuloj. Kiel filo de aktorino li naskiĝis la 19 februaro 1809 en Boston (Usono). Lia fleĝpatro zorgeme dediĉis al lia edukado, sed tiel la studento kiel ankaŭ la instruato de la militlernejo en Westpoint vivis malbonkonduite, diboĉe Veninte en malfeliĉon, la fleĝpatro forlasis lin kaj transdonis lin al la fatalo. Poe edziĝis kun sia kuzino Virginio Klemm. Lia novelo „A manuscript found in a bottle“ estas premiita kaj li fariĝis redaktoro de la „Southern Literary Messenger“ en Richmond. Sed ĉi tiu okupado ne konvenis al li kaj vagade li estis jen en Philadelphia jen en New York kiel redaktoro de diversaj gazetoj; penplena streĉado, la edzina morto kaj drinkemo detruis lin pli kaj pli. Tiel mortis tiu eminentulo en la malsanulejo de Baltimore kvardekjara en 1849. En 1827 aperis lia unua poema kolekto „Tamerlane and other poems“, 1829 la dua „Al Aaraaf, Tamerlane, and minor poems“, 1840 sekvis la ĉefverko „Tales of the grotesque and arabesque“ kiu enhavas 24 rakontojn, 1845 aperis la „Tales“ kaj 1848 „Eureka, a prose poem“.

Muziko.

Je la 75-a datreveno de l' mortotago de Chopin.

Certe la plej genia fortepiana komponisto de la postklasika epoko estas la polo Fr. Chopin (nask. 1. 5. 1809 en Warszawa, mort. 17. 10. 1849 en Paris). Enigmaj estis liaj unuaj komponaĵoj, nokturnoj, muzikbaladoj, valsoj kaj mazurkoj; ĉar ili estis — rilate al la prezentado de la ritmo — tute novaj kaj mirindaj. Do la solvo de la enigmo muzika estis fia: la ŝajne konfuzaj skribsignoj fariĝis jenaj duonrevantaĵaj, duonpasiaj tonformitaĵoj, regantaj ĉiutempe la kamparon de la moderna fortepiana muziko. La enhavo de liaj komponaĵoj absolute estas sentado kaj pasieco, do pli multe pasiva ol aktiva, ĉar sensukcese oni serĉas energion kaj agoforton. Do ili ĉiuj sonas en tute nova parolo: la molameliodeco, la subtila, eksterordinara ritmo kaj la ofte fremdmaniera harmonio. Tiel la „majstro de la plej alta rango“ staras antaŭ nia memoro per la gloro esti aparta en sia speco kaj neatingita.

Muziko estis lia tuta viveco, kaj eĉ observante pentraĵojn li imagis aŭdi ian muzikon. Escepte pluaĵn vojaĝadon li vivis en Paris suferanta je fizi, honorata, ja adorata precipe per la aristokrato. En lia domo en Chaussée d'Antin la aristokratoj vizitis lin ofte, kion la artisto malagrabla sentis kiel ĝeno en sia soleco. Ĉi tie konvenis Liszt, Heine, Meyerbeer, Nourrit, Eugène Delacroix, George Sand.

Mortante li ankoraŭ postulis kanton, kaj la dukino Delfino Potacka, kiu fleĝis lin, kantis la gravan himnon je la sankta virgulino, kiu laŭ onidiro iam savis la vivon de l' Stradella.

„Ho kiel bela, Dio mia, kiel bela ĉi-tiu estas! — Ankoraŭfoje, ankoraŭfoje!“ kaj tiam li mortis.

Sur la Père la Chaise inter Cherubini kaj Bellini li dormas eterne.

Tamen per siaj verkoj li vivas eterne kiel tonartista genio, kies komponaĵoj ĉiutage kaj ĉiutempe troviĝas kaj trovas la plej dankemajn adorantojn.

H. D., Horrem.

* * *

La deveno de la „Yankee Doodle“

(Usona popolkanto).

Inter la riĉaĵoj de la Astor-biblioteko en New York troviĝas ekzemplero de malnova kanto, kiu iam dum la fondado de Nieuw-Amsterdam (nuna New York) estis tre ŝatata de la nederlandanoj. Ĝi estis transmetita tien de la nederlandanoj kaj estis kantata je la sama ario kiel la nuna Yankee Doodle. La komenco estis: „Fraŭllin o Do edel volas havi min“ Kiam la angloj venis por enloĝigi en Nieuw-Amsterdam, ili ankaŭ akceptadis la kantojn de siaj antaŭuloj kaj el la „Fraŭllin o Doedel“ devenis fiatepe la „Yankee Doodle.“

Remi Van Eynde, Berchem-Amsterdam.

Lingvistiko.

Lernado de lingvo sen lerndevo.

Jam en „IK“ mi skribis pri tiu nova problemo, kiu depost kelka tempo okupas la instruistojn de fremdaj lingvoj kaj la senfinan nombron da lingvoflernantoj, kiuj ne sukcesis ĝis nun pro iu motivo.

Efektive multaj personoj devas ankoraŭ lerni vivantajn lingvojn kaj tiam, kiam Esperanto plene havos la rolon de dua lingvo apud la gepatra lingvo, sendube multaj personoj pro iuj specialaj celoj ankoraŭ lernos fremdajn lingvojn. Ĝis tiam pasos ankoraŭ kelka tempo kaj pro tio la praktikisto ankoraŭ ĉiam devas ankaŭ interesiĝi pri la studado de vivantaj lingvoj.

La postmilita cirkonstanco, kiu interkontaktigis tiom da popoloj kaj nacioj al novaj, kun kiuj oni ĝis nun ne havis rilatojn, la fakto, ke multaj personoj ne plu povas trovi sufiĉan panon en propra hejmlando, devigas ilin elmigri al landoj. Se plejparte la elmigrantoj estas sptraj praktikistoj en sia fako, ili estas novuloj en lingva rilato. Sed la lingva flanko estas tiom grava en la nova laborsfero.

Multaj iras en fremdajn landojn, nesciante la fremdan lingvon. Fremda ĝi sonas al iliaj oreloj dum la restado de la unua tempo. Iom post iom ili alkutimiĝas al la koncerna lingvo. Post kelka tempo ili havas bonan lingvan fundamenton por finlerna la idiomon. Percepta kono kaj intuicio siaparte ankoraŭ akcelas la alproprigon.

Restas tamen multaj personoj, kiuj ne povos elmigri, ĉar mankas al ili la necesaj rimedoj, rilatoj aŭ io alia. Aliparte ilia profesio postulas la konon de fremda lingvo. Tre malgranda estas relative la aro de personoj, kiu majstris fremdan lingvon. Plejofte tiuj personoj dum longa tempo estis en eksterlando. Al la enlandano do restas la studado per helpo de instruisto aŭ propra lernado en hejmo. Speciale la lasta nun akiras pli kaj pli grandan rolon pro la multokupiteco de multaj personoj.


Tiu, kiu dum multaj jaroj en lernejo pene studadis kaj parkere lernis francajn kaj anglajn gramatik-regulojn, ne plu havas guston sekvi la saman vojon. Li ankaŭ scias, ke tiu vojo estis malĝusta, ĉar li malgraŭ granda diligenteo praktike profilis nenion.

La plejnova sperto de la instruado montris, ke gravan rolon en la lingvostudado ludas la psikotekniko kaj la aŭtosugestio. Sukceshaviganta lingvisto Mertner antaŭ da jaroj jam publikigis specialan metodon, bazantan sur la principo de sugestia-mekanika lernigado de fremda lingvo. Detalojn pri la metodo mi jam aludis en mia artikolo en IK 17. Mi ĵus ricevis la italan eldonon de la metodo. Ĝi estas kopio de la jam ekzistanta franca kaj angla eldono. La tuta aranĝo taŭgas por seriozaj interesatoj pri akiro de praktika lingvosocio. Mertner enkondukas tuj en la ĉiutagan lingvon. La rezulto estas certa. Post ne longe la lernanto havas praktikan bazon, kiu ebligas maksimuman perfektecon.

Cetere oni aplikis jam kelkfoje saman metodon por instruado de Esperanto. En Esperanto-lecionaro en „Der Deutsche Rundfunk“, Berlin, s-o telegrafa direktoro Behrendt aplikadas similan sistemon.

Mi rekomendas al lingvo-lernemuloj kaj lingvistikaj interesatoj pro detaloj sin turni al Gesellschaft zur Verbreitung zeitgemässer Sprachmethoden, Kempton (Allgäu), Germanujo. R. Kr.

Varbu abonantojn por ET!



Peza Fret-Lokomotoivo.

ino Doedel“ devenis fiatepe la „Yankee Doodle.“

Remi Van Eynde, Berchem-Amsterdam.

Lingvistiko.

Lernado de lingvo sen lerndevo.

Jam en „IK“ mi skribis pri tiu nova problemo, kiu depost kelka tempo okupas la instruistojn de fremdaj lingvoj kaj la senfinan nombron da lingvoflernantoj, kiuj ne sukcesis ĝis nun pro iu motivo.

Efektive multaj personoj devas ankoraŭ lerni vivantajn lingvojn kaj tiam, kiam Esperanto plene havos la rolon de dua lingvo apud la gepatra lingvo, sendube multaj personoj pro iuj specialaj celoj ankoraŭ lernos fremdajn lingvojn. Ĝis tiam pasos ankoraŭ kelka tempo kaj pro tio la praktikisto ankoraŭ ĉiam devas ankaŭ interesiĝi pri la studado de vivantaj lingvoj.

La postmilita cirkonstanco, kiu interkontaktigis tiom da popoloj kaj nacioj al novaj, kun kiuj oni ĝis nun ne havis rilatojn, la fakto, ke multaj personoj ne plu povas trovi sufiĉan panon en propra hejmlando, devigas ilin elmigri al landoj. Se plejparte la elmigrantoj estas sptraj praktikistoj en sia fako, ili estas novuloj en lingva rilato. Sed la lingva flanko estas tiom grava en la nova laborsfero.

Multaj iras en fremdajn landojn, nesciante la fremdan lingvon. Fremda ĝi sonas al iliaj oreloj dum la restado de la unua tempo. Iom post iom ili alkutimiĝas al la koncerna lingvo. Post kelka tempo ili havas bonan lingvan fundamenton por finlerna la idiomon. Percepta kono kaj intuicio siaparte ankoraŭ akcelas la alproprigon.

Restas tamen multaj personoj, kiuj ne povos elmigri, ĉar mankas al ili la necesaj rimedoj, rilatoj aŭ io alia. Aliparte ilia profesio postulas la konon de fremda lingvo. Tre malgranda estas relative la aro de personoj, kiu majstris fremdan lingvon. Plejofte tiuj personoj dum longa tempo estis en eksterlando. Al la enlandano do restas la studado per helpo de instruisto aŭ propra lernado en hejmo. Speciale la lasta nun akiras pli kaj pli grandan rolon pro la multokupiteco de multaj personoj.

Tiu, kiu dum multaj jaroj en lernejo pene studadis kaj parkere lernis francajn kaj anglajn gramatik-regulojn, ne plu havas guston sekvi la saman vojon. Li ankaŭ scias, ke tiu vojo estis malĝusta, ĉar li malgraŭ granda diligenteo praktike profilis nenion.

La plejnova sperto de la instruado montris, ke gravan rolon en la lingvostudado ludas la psikotekniko kaj la aŭtosugestio. Sukceshaviganta lingvisto Mertner antaŭ da jaroj jam publikigis specialan metodon, bazantan sur la principo de sugestia-mekanika lernigado de fremda lingvo. Detalojn pri la metodo mi jam aludis en mia artikolo en IK 17. Mi ĵus ricevis la italan eldonon de la metodo. Ĝi estas kopio de la jam ekzistanta franca kaj angla eldono. La tuta aranĝo taŭgas por seriozaj interesatoj pri akiro de praktika lingvosocio. Mertner enkondukas tuj en la ĉiutagan lingvon. La rezulto estas certa. Post ne longe la lernanto havas praktikan bazon, kiu ebligas maksimuman perfektecon.

Cetere oni aplikis jam kelkfoje saman metodon por instruado de Esperanto. En Esperanto-lecionaro en „Der Deutsche Rundfunk“, Berlin, s-o telegrafa direktoro Behrendt aplikadas similan sistemon.

Mi rekomendas al lingvo-lernemuloj kaj lingvistikaj interesatoj pro detaloj sin turni al Gesellschaft zur Verbreitung zeitgemässer Sprachmethoden, Kempton (Allgäu), Germanujo. R. Kr.

Normala Peza Pasaĝera Vagono.

Tiel dum lia malĝoja vivo kiel ankaŭ post lia morto atakoj ĉiuspecaj iĝis kontraŭ liaj verkoj, precipe pri liaj eksterordinaraj ecoj: jen plena bonhumoro, jen la plej malmultaj koloroj, jen misika profundeco aŭ skeptika vido, jen animieruanta melanĉolio.

Kvankam liaj kontraŭuloj, per siaj akraj recenzoj, akuzis lin pri frenezeco, li restas tamen la stranga genio kaj enigmo por la kritikistoj per liaj ne forĝeblaj homofatalaj verkoj, la fruktoj de malriĉa, batalema vivo.

H. Dahmen, Horrem.

Tiajn tuberojn oni aŭtune ne povas ĝermigi eĉ transportinte ilin en varmon; sed ni sukcesos facile, kiam pasis ilia ĉefa ripozperiodo, ekz. en februaro.

Ankaŭ malemo de diversaj semoj kontraŭ antaŭtempa ĝermiĝo bazas sur ripozo periodo i. e. sur evolua periodeco ĝenerale: multaj semoj bezonas unu aŭ du ripozjarojn antaŭ la ĝermiĝo, kvankam dum tiu longa tempo la eksteraĵ vivokondiĉoj estis trege ofte favoraj al ilia evoluo. La hibernistoj bone konas la bulbojn, kiuj restas „sidentaj“, se oni tro baldaŭ — en novembro — volis per varmo plifruigi ilian evoluzion; per sia nesufiĉe kreskinta infloresko, malbelaspekta kaj inter folioj presidanta, la vegetalo montras, ke ĝia kulturinto pro sia nescio agis kontraŭ la firmaj leĝoj de la evoluo.

Kontraŭe, la populkitimoj (supersticio) de „floroj de S-ta Barbara“ i. e. detranĉadi ĉerizajn branĉetojn komence de decembro aŭ fine de novembro por ke ili en varmo disfloru antaŭ la kristnasko, bone atentis, ke de decembro, la vintro ripozo de la burĝonoj (ĉerizaj) transiras en novan periodon de evolua kapableco. (De ĉi tiu tempo, la varmo plifruigas malfermiĝon de la burĝonoj.)

Sed ankaŭ la vivofenomenoj, kiuj ŝajne forte bazas en la organismo vegetala, ni scipovas ŝanĝi, ĝis certa grado, per taŭgaj aranĝoj kaj elektante taŭgajn vegetalojn speciale inklinaĵojn por iliaj eksperimentoj.

Se oni deziras ekflorigi vegetalojn kun bone rimark-ebla ripozperiodo en alia tempo ol la normala, ekz meze de vintro, ĝi povas okazi per du manieroj:

1. oni plilongigas la ripozperiodon per daŭranta malvarmo. En la naturo oni observis, ke fruprintempaj vegetaloj, eĉ lignecaj, ekz. avelo, vekigas en milda vintro tre frue al florigo (polvantaĵaĵ amenoj avelaj en januaro, floranĵaj anemonoj kaj primoloj en februaro), dum altempe la forta kaj daŭra vintro malfruigas la kreskon (longa ripozo) al diversaj vegetaloj per daŭranta malvarma temperaturo: konvaloj, lilioj, siringoj, rozoj k. a. lignecaj vegetaloj, se ili estas metitaj en la komenco de sia ripozo periodo, en malvarmejon kun temperaturo daŭre iom sub la nula, restas en neŝanĝita stato dum la periodo de sia normala evoluo (prinpio kaj somero), post kio oni povas ilin kiam ajn aŭtune aŭ vintre per varmo evoligi kaj florigi.

Tiu ĉi metodo estas tre ŝatata en la ĝardena komercio, ĉar ĝi ebligas enkonduki en laŭvola jarsezono sur foiron

florantajn konvalojn, siringojn kaj aliajn foiraĵajn florojn. La eblico havi ĉiam sub la mano provizon de evoluo-kapablaj vegetaloj, florigeblaj en 10—20 tagoj, parte kom-pensas la iom grandan koston de la longtempa konservado en malvarmejoj.

La spertoj de kulturantoj de ĉambraj floroj montras, ke la ripozo periodo estas favorata, se oni metas ilin vegetalojn post ilia florado en ĉambrojn pli malvarman aŭ se oni lasas ilin „ripoz“i dum iu tempo per tio, ke oni iom post iom malgradiĝas la akvumadon ĝis preskaŭa sekiĝo aŭ ke oni interrompas la sterkadon k. s. Se por prinpio grafiado oni irandaĵ grefojn januare aŭ februare konservante ilin poste en kela malvarmo, tio havas la saman celon, t. e. ĝi la ripozajn periodon iom pli longa ol ĝi estas en la naturo eĉ nekulturitaj vegetaloj grefitaj.

2. Oni mallongigas la naturan periodon de ripozo (kalkulate de la lasta periodo). Tiu ĉi interveno oni taŭge povas nomi plifruigo de florado; por la ĝardenista komercio ĝi havas grandegan valoron, ĉar ĝi ege mallongigas la tempon necesan por zorgo pri la vegetaloj kaj sekve malgrandigas la produktado-kostojn. Ekzistas du metodoj de plifruigo. I. interesaj: a) narkotizado i. e. enfermantaj vegetaloj evoluekapablaj por 12—48 horoj en vaporo de etero aŭ kloroformo, oni pligrandigas ĝian sentemon pro la lumo; b) varma akvobano, proksimume 50—56 grada, dum 10—16 horoj, vekas la dormetantajn vivoprocecojn de vegetaloj.

La vegetaloj preparitaj per la unua aŭ la dua maniero ekfloras en varmejo, post duona kaj eĉ malpli granda tempo ol ordinare. La influo de la varma bano, kies temperaturo kaj daŭro estas modifita por la respektiva speco de vegetalo laŭ la spertoj, efikas frapante kaj surprize: suflanke la stimulo pro pli rapida evoluo konserviĝas dum multaj tagoj (la banita vegetaloj oni povas ankaŭ nur post pli longa konservado florigi), aliflanke la influo de la bano estas loke limia kaj ekz. la banita duono de siringa arbo ekfloras, dum ke la nebanitaj burĝonoj apenaŭ malfermiĝas.

La fruajn floradojn de vegetaloj oni povas atingi ankaŭ per tio, ke la tuta ripozo periodo estas retroŝovita. Holandaj florbuloj estas aŭtune sendataj en Italujon kaj Sudan Francujon kaj, esante tie kulturitaj dum vintro kaj prinpio en klimato notinde pli varma, ili plirapidigas sian evoluzion tiel, ke, referitaj fine de somero, ili ekfloras jam frue aŭtune.

El la ĉeĥa R. Hromada, Praha.

Filatelo.

Irlando.

Antaŭ kelka tempo jam aperis belegaj novaj markoj de Irlando.

1. Duonpenca, leaf pingin (elp.: lat fion) nomo Èire = Irlando super orforma fono sur kiu troviĝas mano portanta plavon flamantan kaj devizo "An claideam soluis" (elp.: an klaiv solis) = la glavo de lumo. Koloro helverda.
2. 1 penca, pingin (elp.: pion) super arkaĵo la sankta trifolio; sur arkaĵo la nomo Èire; ambaŭflanke sur arkaĵo, kelta ornamajo; sub la arkaĵo, mapo de Irlando; koloro, rozruĝa.
3. 2 penca, da pingin (elp.: ga fion) sama kiel n-o 2. Koloro blugruza.
4. 2 1/2 penca, da pingin go leit (elp.: ga fion go leit) fono de trifolio, sur ŝildo, blazono de la kvar provincoj de Irlando. Super la ŝildo nomo, Èire. Supre dekstra blazono de Connacht = duon-anglo kaj brako kun glavo. Malsupre dekstra blazono de Munster = tri kronoj. Supre maldekstra blazono de Leinster = harpo. Malsupre maldekstra blazono de Ulster = ruĝa mano kaj kvar punktitaj kampoj. Koloro ruĝbruna.
5. 3 pence, tri pingine (elp.: tri pinej) kelta kruco sur ornamajo; sur kruco, nomo Èire, en ĉiu angulo, trifolio Koloro blua.
6. 4 pence, ceitre pingine (elp.: kahir pinej) sama kiel n-o 4. Koloro blugruza.
7. 5 penca, ĉiuz pingine (elp.: kuig pinej) sama kiel n-o 1. Koloro violpurpura.
8. 6 penca, se pingine (elp.: ŝej pinej) sama kiel n-o 1. Koloro ruĝpurpura.
9. 9 penca, navi bpingine (elp.: nej binej) sama kiel n-o 4. Koloro violpurpura.
10. 10 penca deĉ bpingine (elp.: dek binej) sama kiel n-o 5. Koloro bruna.
11. 1 ŝilinga = scilling (elp.: skilling) sama kiel n-o 1. Koloro helblua.

Emma L. Osmond, London.

Svedujo.

Kaŭze de la tutmonda poŝtkongreso en Stockholm dum la pasinta somero estas eldonitaj du novaj serioj da poŝtmarkoj. Unue la sveda poŝto eldonis serion, en kiu la 12 unuaj valoroj: 5, 10, 15, 20, 25, 30, 35, 40, 45, 50, 60, 80 oeroj, montris siluetojn el Stockholm kun 4 turoj kaj enskribo: „VIII e Världspostkongress Stockholm“, la tri plej altaj valoroj de la sama serio: 1, 2, kaj 5 kronoj, estis de alia tipo: ili montris la bildon de la reĝo Gustav V. kaj havis la saman surskribon.

Dum la poŝtkongreso estis solenata la 50-jara ekzistado de la tutmonda poŝta ligo, kaj kaŭze de tio la sveda poŝto eldonis novan serion enhavanta la samajn valorojn, kiel ĉi supre nomitaj, sed de alia aspekto. Ili montras rajdantan poŝtiston laŭ antikva tipo kaj en la supra maldekstra angulo modernan flugmaŝinon. La surskribo estas: „Union Postale Universelle 1874-1924, Sverige“. La tri plej altaj valoroj montras flugantan kolombon, kiu portas leteron en la beko kaj havis la saman surskribon.

Kompletaj serioj de la markoj estas malofraj, kaj la preso de stampitaj markoj estas la samaj kiel tiuj de novaj. Kiam ĉi tiuj linoj estas legataj, la markoj eble estas finvenditaj ĉe la svedaj poŝtoficejoj, sed la delegito en Stockholm eble povas havigi la markojn al kolektantoj per aĉeto ĉe poŝtmarkvendistoj.

Aerveturado.

Zeppelin-aerŝipo transpasis Atlantikon.

En ET 212 (Tekniko) kaj en lasta numero de nia gazeto (Aerveturado) ni jam informis pri la preparoj kaj la sukceshavigita veturado de la aerŝipo Zeppelina Z. R. 3 (L. Z. 126).

Intertempe la ŝipo bone alvenis en Lakehurst en Usono, kie troviĝas la usona armea aerŝipa haveno.

Kiel ni jam raportis, la ŝipo forveturis la 12. 10. matene de Friedrichshafen (Bodense), superveturis Francujon ĝis Bordeaux, pasis la golfon de la Gironde kaj veturis al Hispanujo laŭlonge de la golfo de Biscaya. Tie ĝi forlasis la eŭropan kontinenton, transpasis la Acoraja insulojn por poste transpasi la oceanon. Fortaj ventoj kaj atendata ventego devigis la ŝipon ŝanĝi la vojon. Ĝi veturis norden ĝis Nova Skotlando, poste direktiĝis al la amerika kontinento, pasis super Halifax, New York kaj Boston kaj pelite de l' rapida vento atingis en rapideco de 90 mejloj po horo la stacion de Lakehurst.

La transatlantika transveturo per Zeppelin-a aerŝipo havas similan signifon kiel la iam perŝipa transveturo de la oceano de Kristoforo Kolon (Kolombio) malkaŝinte Amerikon. Siatempe la helpiloj kaj rimedoj estis trege primitivaj. Hodiaŭ la moderna tekniko forigis la malfacilaĵojn. Grandegaj marŝipoj krucciras la oceanon. Nun la tekniko triumfis kaj sendis ŝipon tra la aero.

Z. R. 3 ne estas tamen la unua aerŝipo, kiu transveturis la oceanon. Jam en 1919 angla aerŝipo, kopia konstruĵo de Zeppelin-a modelo veturis de Skotlando al Lsono kaj revenis. Sed estas konate, ke la aerŝipo travivis multajn malfacilaĵojn, devis peti radiotelegrafe eventualan helpon de marŝipo kaj alteriĝinte nur havis ankoraŭ materialon por unuhora veturado.

Z. R. 3 starigis rekordon. Dum ne malpli ol 81 horoj 25 min. la aerŝipo estis survoje kaj transpasis distancon de 5000 mejloj. Post alteriĝo ĝi havis ankoraŭ veturan provizon por du veturiagoj. Ĝi transportis 51 personojn, inter kiuj troviĝis krom la direktantaro, la mekanikistoj kaj inĝenieroj, usonanoj, kiuj prenos sur sin la estontan direktadon de la aerŝipo post akcepto per la usona registaro. Rimarkinde por teknikistoj estas, ke la motoroj de la aerŝipo (sistemo Maybach) funkciis dum la tuta veturado senriproĉe kiel la tuta veturado okazis sen iuj eĉ etaj malfacilaĵoj. Estas antaŭvideble, ke novaj spertoj de la transveturado estos sekurigaj detaloj por estonta regula transatlantika aerŝipa veturado.

Teknikistoj kaj aerveturistoj povas esti fieraj pro tiu ĉi sukceso de la moderna tempo. Ni simplaj homoj tamen devas saluti la sukceson kiel venkon de paca ideo, kiu sendube povas helpi la reciprokan amikiĝon de la tuta homaro. Sur paĝo 5 ni povas montri sur karto la vojon faritan de la aerŝipo kaj ilustraĵon kun bildo de D-o Jckener, la kondukinto de la ŝipo, inter usonaj oficiroj.

R. Kr.

Financaj informoj.


Unuiĝo de kooperativoj por militdomaĝoj.

Eldono 1921 (4%).

Eltirado de 1 septembro 1924.

S 130440 N 19	repagebla je fk.	250 000
S 149776 N 3	" "	100 000
S 43490 N 2	" "	50 000
S 130440 N 15	" "	50 000
S 43490 N 7	" "	50 000

La aliaj numeroj de tiuj serioj kaj ĉiuj numeroj de la serioj 158738 kaj 138996 estas repageblaj je 250 fk.



Elektra Lokomotivo de Pensilvania Fervoja Kompanio.

Eldono 1922 (5%).

Eltirado de 10 septembro 1924.

S 31735 N 11	repagebla je fk.	500 000
S 14751 N 8	" "	100 000
S 31735 N 19	" "	100 000

La aliaj numeroj de tiuj serioj kaj ĉiuj numeroj de la serio 89440 estas repageblaj je 300 fk.

Eldono 1923 (5%).

Eltirado de 20 septembro 1924.

S 267460 N 3	repagebla je fk.	500 000
S 200231 N 1	" "	100 000
S 266577 N 2	" "	50 000
S 363847 N 5	" "	50 000
S 365536 N 1	" "	50 000

La aliaj numeroj de tiuj serioj estas repageblaj je 550 fk.

La repago de la eltirataj titoloj okazas pere de la Nacia Banko de Belgio.

Fr. Schoofs, Antwerpen.

Radio.

Reproso en nacilingvaj radio-gazetoj nepre rekomendata!

Centra Komitato de Sovetlanda Esperanta Unuiĝo sciigas tutmondan aŭskultanton, ke 30. oktobro de nuna jaro je la ordinara tempo (14.45 hor. laŭ MET. = mez-eŭropa tempo) ondlongeco 3200 m okazos radiotelefona parolado, transdonota de Moskva Radio-Telefonstacio je la nomo de Komintern pri „Sepjara Diktatoreco de Proletariaro“. Ĝin faros s-o P. F. Jakovlev, Prezidanto de Sovetlanda Esperanta Unuiĝo.

Ĉiuj aŭskultantoj ĉi tiun paroladon bonvolu sendi sciigojn kaj eltrancaĵojn el gazetoj kaj ĵurnaloj laŭ adreso: Ruslando, Moskva, Poŝtkesto n-o 650.

Represado de ĉi tiuj sciigoj en naciaj taggazetoj kaj ĵurnaloj estas trege dezirinda.

Centra Komitato de Sovetlanda Esperanta Unuiĝo.

København.

Internacia Radio-Asocio elsendos la 29. okt. je la h. 9-9 1/2 de la radio stacio de København (Danujo) koncerton kun esp. kantado kaj paroladoj de la dana sekretario de I.R.A. s-o Lendorff, kaj de f-lino Rybo, prezidanto de „Societo de Esp. Interesatoj“. — Ondlongeco 700-750. — Estos de grava signifo, se la eventualaj aŭskultintoj tuj informos Dansk Radio-Klub, Bredgade 69, København K, pri aŭdo-rezultato kaj la deziro de l' ripetado de samaj aranĝoj kaj eventuala starigo de Esperanto-kurso.

München.

Depost 16. oktobro 1924 ĉiujdiĝe je la 7 1/2 h. vespere esp. lecionoj de s-o Koch

Germanaj k. eksterlandaj gesamideoj sendu konsentskribaĵojn al „Deutsche Stunde in Bayern, Karlstr. 21/3, München“.

Joh. Bernhard.

Stuttgart.

La 5 novembro, vespere je la 8 h. s-o bankisto D-o Vogt, vicprezidanto de Germ. Esp. Asocio, faros radioparoladon pri „Esperanto kaj la lernejoj“ (ondlongeco 437).

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informero, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrat. aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Afriko.

Tunizio.

Bouzarea. S-o Marius Laurent, indigena samideano de la insulo Réunion (Afriko), antaŭe en Marseille, nun fervore propagandas Esperanton. Li klopodadas restarigi lokan grupon kaj revigligi la movadon en Tunizio.

Madagaskaro.

Ambohvianovo (Tananarivo). La movado revigligas. S-o J. L. Andrianasolo propagandas nian aferon ankaŭ en indigena gazeto kaj intencas restarigi grupon. De antaŭmilitaj samideanoj malkaŝaj ankoraŭ propagandas s-o Rakoton Drainisa Dennis Bephring kaj s-o grandkomercisto Razafimahozo. Mankas propagandiloj kaj detalaĵ gramatiko en diversaj lingvoj.

Ameriko.

Kolombio.

Bogota. Nia fervora kataluna samideano kaj protektanto de ET s-o I. Gili-Norta ĵus forlasis Kolombion por reiri al Hispanujo. Dezirante al li bonan hejmenvenon, ni esperas, ke la samideano en Kolombio, kiun li vizitis dum sia preskaŭ dujara vojaĝo en tiu lando, sekvas lian ekzemplon de senlaca propagandado por nia granda afero.

Eŭropo.

Albanio.

Shkodër (Skutari). S-o D. Shantoja ĵus finis kurson kun 5 lernantoj. La Esperanto-movado tute lastaj monatoj pro politikaj cirkonstancoj progresis nur malrapide.

Anglujo.

Birmingham. La grupo ĉi tie kunvenas regule ĉiumerkrede. Sep Esperanto-kursoj funkcias en diversaj partoj de la urbo, kaj multe da intereso vekigis ĉe la laborista rondaro por nia afero kaŭze de esp. lecionoj kiuj aperis en loka organo de laboristoj „Weekly Town Crier“. Ĉiu sanktejo havas sian sanktulon, kaj ĉi tie mi havis la honoron renkonti s-on Milward la tradukinton de la ĵus aperinta libro en Esp. de Edgar Allan Poe, fama usona verkisto.

J. D. A.

Belgujo.

Mechelen, Malines. La flua grupo starigis novan kurson per parolado de s-o Schoofs, Antwerpen.

Britujo.

En Ellsmere-Port, vilaĝo apud Chester, kie okazis la nuna Brita Esp. Kongreso, la Eduka Komitato enkondukis Esperanton dum la nuna semestro en Cambridge Rd. Council School. 59 knaboj el la supera klaso devige lernas nian lingvon nun. Instruas f-lino Agnes Hogg, fratino de E. Hogg, kiu antaŭe instruis kaj sukcesigis la esp. klasojn en Eccles. Korespondantoj skribu al la instruisino pere de la lernejo.

J. D. A.

Francujo.

Kronenburg apud Strasburgo. Esperanta kurso komenciĝis la 14. 10. 24 en la lernejo Mittelhausberg Strasse.

Paris. La nombro de okazantaj kursoj estas ĝis nun 10. En la ĉirkaŭaj kursoj okazos en Arcueil, Boulogne sur Seine, Issy les Moulineaux, Juvisy, Levallois, Montmorency, Puteaux, Rosny sous Bois (2), Sevran (2), Vanves, Villeneuve-St. Georges kaj Versailles.

Vanves. La 20 okt. okazis inaŭguro de esp. kurso sub honora prezido de s-o Justin Godard, ministro de laboro, kaj sub efektiva prezido de la urbestro s-o Pic.

Versailles. La 5. okt. okazis kunveno de la Parisa Regiono de UEA. La kunvenintoj estis oficiale akceptataj de reprezentanto de la urbestro.

Germanujo.

Cleve. La Esperanto-Societo Cleve aranĝos la 1. kaj 2. de novembro 1924 propagandan tagon por Esperanto-ligita kun ekpozicio de esperantistoj en la kunveno, Kolpingstrasse 25.

Gesamideoanoj, venu multnombre! Vi estas ĉiuj kore invitataj!

Chemnitz. La 2. XI. kunvenos ĉi tie la novfondita Saksia-Turinga Ligo, kunvokata de urbokonsilisto Feder.

La tre grava „Allg. Zeitung“ publikigis 5 foje artikolojn por (3) kaj kontraŭ (2) la enkonduko de Esperanto en la superajn lernejojn.

Supera ciferstaranto Sente gvidas kurson ĉe policanol. 50 partoprenantoj.

Restarigo de Sudokcidentgermana Esp. Ligo (S. O. L.)

Sub prezido de s-o redaktoro R. Kreuz, eksprezidanto de S. O. L., okazis la 12. 10. en Frankfurt a. M. la restarigo de S. O. L. kun la celo plifortigi la internan organizon de la GEA. Ĉeestis pli ol 50 reprezentantoj de Mannheim,

Mainz, Wiesbaden, Frankfurt a. M., Offenbach, Hanau, Fulda, Kreuznach. S-o Direktoro Hummel, eksprezidanto de Frankfurta Grupo kaj fondinto de S. O. L. speciale salutis la festintojn. Oni decidis fari la malnovan teritorion de S. O. L. nova agadkampoj. Oni plue decidis pri kotizo de 10 pf. po membro kaj monato al la Ligo, kiu kaŭre kontaktigos kun G. E. A.

La grupo de Mannheim ne aligos por povi restarigi la Badenon Esp. Ligon. — Estrara grupo fariĝis la grupo de Wiesbaden, prezidanto s-o instruisto K Schönrich, Wiesbaden, Emserstrasse 58.

Frankfurt a. M. La festo okazis de l' datreveno de la grupfondiĝo bone sukcese. S-o Schukowski salutis la festintojn. S-o Kreuz feris la festparoladon kaj en esperanta parolado honoris la fondintojn, el kiuj s-o Barthel, Seidel kaj Fernkopf fariĝis honoraj membroj. S-on Kličner oni nomis honorprezidanto. Al la nuna prezidanto s-o Schukowski diplomo pro sukcesa direktado estis irandonata. S-ino Barthel-Edler muzikis, direkto estis irandonata. S-ino Barthel-Edler muzikis, direkto estis irandonata. S-ino Barthel-Edler muzikis, direkto estis irandonata.

Wiesbaden. La 18 kaj 19 oktobro okazis la ĉefkunveno de la „Rejna Trafik-Sindikato Godesberg“. S-o lahn, delegito de U. E. A. el Godesberg, faris paroladon pri „Esperanto kiel trafika varbilo“. La Wiesbadena Esperanto-Grupo estis aranĝinta belan ekspozicion de esperantistoj koncerntaĵojn la trafikon. Parolado kaj ekspozicio faris bonan impreson.

Grekujo.

La Esperanto-movado bone progresas kaj enpenetras en la fakserojn. Jus fondiĝis grupo de policistoj-esperantistoj sub prezido de s-o Const. Gardikas, ministeria sekcia ĉefo, kiu fariĝis honora vicprezidanto de T. P. L.

Litovio.

Esperanto venkos per ĝia praktika aplikado!

Kompreneble tion Litova Esperanto Asocio jam trian jaron eldonadas monatan ĵurnalon „Litova Stelo“ sole en Esperanto kiel informilon pri sia lando kaj popolo. Ĝi estas sendata senpage al ĉiu, kiu aperigos en sia naciolingva ĵurnalo tradukojn el ĝi. Adreso: Kaunas, Litovujo, Rotušės aikšė n-o. 6.

Nederlando.

La Haga Grupo „Fine ĝi venkos“ aranĝis esp. ekspozicion (19-21 sept.) f-lino J. Westerman, membrino de la Parlamento Nederl., malfermis ĝin antaŭ plena salono. La prezidantino, s-ino Isbrücker, mallonge klarigis la gramatikon kaj donis resumon de la esp. literaturo. Entute 500 personoj vizitis la ekspozicion, inter kiuj la ĉefinspektoro de instruado kaj aliaj aŭtoritataj personoj. Novaj kursaĵoj kaj membroj pruvis la deziraĵan sukceson.

Ruslando.

Korekto. S-o E. Drexler en Moskva petas nin korekti, ke en ET n-ro 212 li estas erare citita kiel prezidanto de SEL, ĉar pro tro okupiteco li lastatempe forlasis la oficon de prezidanto. Li restas nur unu el la tri membroj de Prezida Komitato de SEL. Nuna prezidanto estas k-do lakovlev.

Esperanto en Lernejoj.

Germanujo.

Brinkum de Bremen. La 11 oktobro la lokaj grupoj de GEA Syke kaj Kivševyhe kaj la Vendreda Klubo Bremen aranĝis propagandvesperon. Paroladis s-o Heimüller, Bremen. Nova kurso komenciĝis la 18. 10; ĝis nun anovis sin ĉirkaŭ 15 personoj.

Chemnitz. La ĉi tieca popolernejo enkondukis Esperanton en sian planon. Instruisto: Prof. D-o Wicke.

Freiburg (Silezio). Depost unu jaro okazas en nia senkonfesia lernejo instruado de Esperanto por 20 ĝelernantoj 12-14 jaraĵ. Por ke ili daŭrigu lerni kun intereso, estas dizirinde, ke eksterlandaj gekamaradoj korespondu kun ili. Skribu al instruisto A. Bräuer, Freiburg i. Schl., Germ., Waldenburgerstr. 5, 2. et.

Glabek i. W. La rezistaro en Münster permesis la enkondukon de Esp. en la senkonfesia lernejo jam de nov. de pasinta jaro kaj komence de ĉi tiu jaro ekzistas fakultativa Esp.-klaso. (Komp. inform. ET 215). Bitter.

Alvokoj.

Gesamideoj tutmondaj.

Por sukcesigi esperantan propagandon inter urbanoj en nia urbo kaj aranĝi esperantan ekspozicion por ke ni pruvu al urbanoj ke nia lingvo vere estas tutmonda — bonvolu helpi al mi — sendu diversajn libretojn, gazetojn, ĵurnalojn, PK il., PM, papermonon kaj ĝenerale esperantaĵojn laŭ adreso: Tomilov Anatolio, Uprofbjuro, Petroŭskij-zavod, Zabajkalskaj gub., Siberio, Rusujo.

Germanaj komerc-oficistoj, atentul Al ĉiuj D. H. V. gemembroj.

Se vi havas intereson al la progreso de nia movado, skribu al la Esperanto-grupo „Progreso“ en Bochum i. W. (K. Langner), Hattingersir, 57, ke vi estas D. H. V. membro kaj esperantisto!

Al la tutmonda advokataro.

Estas malnova kaj ofte esprimita ideo, ke nia movado des pli rapide progresos, ju pli multe oni sukcesos utiligi praktike la scion de nia lingvo, ju pli per disvastigita organizo oni estos kapabla, atingi profesian unilon. Ĉar ne povas esti la tasko de UEA, detale dediĉi sin al la interesoj de fakaj grupoj, aparta unuigo de la grupanoj estas nepre necesa. Evidente la advokata profesio tendencas al internacia interrilatiĝo. La etendiĝo de la komercaj rilatoj plimultigas la interlandajn juristajn aferojn kaj procesojn. La advokato komisiita pri procesafero, kiu estu decidota de eksterlanda tribunalo, devas sin turni al korespondanta kolego, al kiu li devas doni detalajn informojn. Krom tio estas eminenta tasko de la

esperantista advokataro, speciale kulturi la internaciajn jurmateriojn (interpopolan juron kaj internaciajn kambian, komercan, patentan, civilan kaj punan jurojn). Ofte okazas ke ankaŭ en enlandaj juraferoj oni devas apliki la eksterlandan juron. Se en tiu okazo la alvokita eksterlanda juristo donus informojn, oni ŝparus multe da tempo kaj oni estus certa, ke la juĝo, donita de la esperantista samideano, estas aŭtentika kaj senduba. Kioman gravan pligrandiĝon de nia fakliteraturo prezentus komuna gazeto, enhavanta valorajn artikolojn pri aluditaj juristoj, kioman sukceson signifus la publika interŝanĝo de ideoj pri la laboro kaj situacio de la advokatoj ĉiulandaj! Tiaj ideoj realiĝu en estonteco!



D-o Eckener kun la amerikaj oficiroj en gondolo de Z.R.3 antaŭ la vojaĝo.

De maldekstre dekstren: sidante: D-o Eckener, kapitano Steele; starante: leŭt. Kreiz, majoro Kennedy, kapitano Klein.

La propaganda forto de tia kuniĝo devas esti tre alte taksata. Ni volas etendi reton de kolegoj sur la tutan mondon, subteni kaj helpi unu la alian kaj varbi novajn anojn en ĉiu granda urbo. Nia propaganda laboro estos konsiderinde faciligata, se ni povos promesi praktikajn sukcesojn al kolegoj, kiuj sekvas nian inviton, se ni povos dissendi kiel eble plej grandan liston de kolegoj al varbotaj membroj.

Ĝis plue ne estu decidate, ĉu ĉi tiu unuigo fariĝu speciala grupo de jam ekzistanta Asocio (ekz. de la Internacia Scienca Asocio) aŭ ĉu rilate al la aparta praktika kaj profesia celo oni laboru sendepende. Ĉi tiu demando estu preparolota kaj decidota okaze de la venonta kongreso.

Necese kaj jam hodiaŭ atingeblas estas, kunmeti la advokataran liston, kiu estu dissendota al ĉiuj interesuloj. Konvinkite pri la neceso de prepara laboro, mi volonte prenos sur min ĉi



La vojo de l' Zeppelin-aerŝipo.

tiun taskon je miaj kostoĵ ĝis la venonta kongreso. Mi petas ĉiujn kolegojn: Sendu ĵuĵ postkardon al la subskribinto, enhavantan la respondon al jenaj demandoj: 1. nomo, 2. adreso, 5. ĉu la kolego praktikas, ĉu la praktiko estas limigita al speciala fako, 4. membro de UEA? Skribu legeble! Mi tre ĝojus, se unu aŭ alia kolego ekinterrilatus kun mi pri la aluditaj problemoj.

D-o Siegfried Liebeck, advokato kaj notario, Berlin C. 19, Spittelmarkt 11.

Stenografistoj laŭ Stolze-Schrey.

Pro troa oficeco mi ĝis nun ne jam povis dissendi la avizitan ĉirkleron. Temas pri speciala propagando en nia afero. La sendintoj de informoj baldaŭ ricevos respondon pri la afero. Robert Kreuz, redaktoro de ET.

Bv. subteni nian propagandon!

Estas organizita kurso por komencantoj kun 20 personoj. Ni intencas pli vastan propagandon. Por ke ni sukcesu, ni petas alsendi esperantaĵojn (legolibroj, ekzercolibro, muzikajoj, gazetoj ktp.) Ni dankas antaŭe. Adreso de la kursgvidanto: Ruslando, Belorusija, Bobrujsk, Vojennaja Prokuratura 5-a korp. N. Povoroznik.

Bibliografio.

Malgranda Terbiblo. 10 Terbilidoj. Projektiitaj de Prof. D-o F. Szerényi, efektiviĝintaj de A. Szerényi. Sennacia Asocio Tutmonda. Granda formato 25/55 cm, 36 paĝoj, sur belega glata papero. Prezo 1,80 mk. aŭ 5,60 sv. fr.

Por la nova mondkonstruado ni bezonas novan eltrovon de la tero, novan kartaran prezentadon de la terbilidoj. Jen la unua malkara atlaso, eldonita de laboristoj por laboristoj, simpla kaj komprenbla. La kartaro de la kartoj rezultas per dukolora presado nigra-blanka kaj per tio, ke la geografaj lokoj estas cititaj liaj, kiaj estas la leksika ortografio tiamaniere estas signifa. Solvo de demando nesolvita en ĉiuj ĝisnunaj kartografaj kongresoj. Ĉerte ĉi tiu enkonduko estas grava paŝo antaŭen sur la vojo al unueco de la mondkartaro: ĉar estas necesa nur unu preskriptaĵo por ĉiuj liaj eldonoj de tiu ĉi atlaso, ŝparante tiel multe da laboroj kaj elspezoj. Ekzistas ekzemple nur Rossia, ne Russland aŭ Russie, nur Nippon, ne Japan aŭ Japon ktp.

La tuta verko estas aranĝita laŭ sennacia vidpunkto, ne montrante vojon al migranto sed per klara mondkoncepto klaran ekkonon de la vivo, komprenon de la estinteco por konstrui la estantecon kaj funde prepari la estontecon kun certeco kaj konvinkita fido kiel antaŭparole diras la projektiinto.

E. Izgur, Nur Volu! La festo de laboro kaj paco. 1924. Sennacia Asocio Tutmonda. 16/24 cm, 16 paĝoj, ilustrita. Prezo: 0,25 mk. aŭ fr sv. 0,40. Vere granda himno el la poezio de proleto, alie idealista kaj lasas enrigardi nin en la profundecon de l' anima vivo kaj kortuŝegantan forton de aktiveco de moderna poeto sovia.

Hans Dahmen, Horrem.

Vivisekcio. Flugfolio en Esp. Senpage ricevebla de Mondaj Ligo kontraŭ Vivisekcio, 47 Hamilton Rd., Highbury, London N. 5.

Internacia Vegetara Kanto. Teksto de C. J. Roskes-Dirksen. Muziko de H. Nolthenius. Traduko de Felix Ort, kaj

Vegetara Kanto. Teksto de Felix Ort. Muziko de H. Nolthenius. Traduko de C. J. Roskes-Dirksen. Ambaŭ en lingvoj esperanta kaj nederlanda. Prezo po 0,10 hfl. Riceveblaj de Nederl. Vegetarier Bond, Amstellaan 20, III, Amsterdam.

Keinotekaisen yhteiskielen mahdollisuuskissa ja esperantos. (Parolado pri la ebleco de artefarita komunlingvo kaj Esperanto.) De H. Salokannel. Prezo 1 fmk. Eldonejo de Ilkka, Vaasa, Finlando.

Congrès National de l' Esperanto, Strasbourg 1924. Oni sendis al ni bele presitan 4-paĝan programon kaj grandan efikan afiŝon pri la koncerto okaze de la kongreso.

Esp. Gazetoj.

Aŭstria Esperantisto, Vien, aŭg., sept., okt. Nova organo de aŭstraj samideanoj. Adreso: Korneburg apud Vien, Hovengasse 12-2-15.

Marto, Halda, sept., okt. Sennaculo, Leipzig-Střitery, Colmsir. 1. N-oj 1, 5, 4. La unuaj numeroj de ĉiusemajna gazeto estiĝinta el antaŭa „Sennacia Revuo“. Ke tiu gazeto sukcesas aperi semajne estas pruvo pri la granda intereso por Esp. precipe inter proletariaj rondoj.

Holanda Esperantisto, Amsterdam, 27 sept. kaj 11 okt. France-Esp. Paris, sept., okt. Esperanto, Genève, okt. Kun diversaj raportoj pri la 16-a.

Katolika Mondo, Graz, aŭg.-sept. Belga Esperantisto, Antwerpen, majo-junio. Völkler-Spiegel, Leipzig, okt. Esp. Verband Berlin, Nachrichtenblatt, okt. Espero Katolika, sept. Nova kolekto, n-o 1. Ilustrita. Adreso: 55, rue de Vaugirard, Paris 6. Rubrikoj: Nia movado, La esp. movado, Katolika vivo, Tra la gazetaro, La novaj libroj, Literatura, Hungara Esperantisto, Budapest sept. Itala Esp. Revuo, S. Vito al Tagliamento, aŭg.-sept.

International Language, London, sept. kaj okt. Enhavas taŝgajn propagando-artikolojn kaj kelkajn ilustraĵojn. — Kun aldone The British Esperantist.

La Movado, Paris, aŭg.-sept. La Espero, Stockholm, aŭg.-sept., okt. Der Arbeiter-Esperantist, Leipzig-Thonberg, okt.

La Interligilo de l' P. T. T., Paris, aŭg.-sept. La Verda Lumo, Shanghai, majo-junio. Adreso: 787 Avenue Foch, Shanghai. Hinjuo.

Luzacia Observanto, Zittau, okt. Litova Stelo, Kaunas, sept. Esperantista Ĵurnalo, Leipzig-Leitmeritz, okt.

La Suno Hispana, Valencia, sept. La Policisto, Budapest, sept. Literatura, London, jul.-sept. Espero Teozofia, Praha, aŭg.-sept. Arguso, Mexico D. F., sept., okt. Int. Medicina Revuo, Budapest, kajero 5. Wereldtaal, Eemnes, okt. Kristana Espero, Tampere, n-o 5-4. La Suda Kruco, Melbourne, jul.

Brazilia Esperantisto, Rio de Janeiro, majo-julio.

Gazetaro.

Reichenberger Zeitung, 10. 8., 11. 8., 17. 8., 1. 9. kaj ĝia Messe-Anzeiger, 14. 8. Artikoloj pri Esp. Freigeist, Reichenberg, 29. 8. kaj 16. 9. Kun esp. anguletoj. Märkischer Sprecher, Bochum, 16. 10. Kun politika sciigo ricevita per Esp.

Schweizer Freie Presse, Baden, 1. 10. kaj Badener Tagblatt, 2. kaj 4. 10. Diversaj artikoloj pri Esp. Les Dernières Nouvelles, Strasbourg, 4. 8. kaj Journal d'Alsace et de Lorraine, 5. 8. Raportoj pri la franca kongreso de Esp.

Strassburger Neueste Nachrichten, 11. 8. Raporto pri franca kongreso de Esp. — 2. 9. Raporto pri la 16-a. L' Indépendant, Perpignan, 6. 10. Pri Amika Roudo. Kurjer Wiczorny, Krakow, 5. 10. Kun esp. kurso.

Der Stadt. Angestellte, Wien 10. 10. Pri esp. kursoj por urb-oficistoj. Gazet van Mechelen, 15. 9. Pri Esp. kaj radio. — 29. 9. Pri Esp. en Mechelen.

La Montagne, Clermont-Fd., 17. 10. Sukceso de Esp. de L. d. N. La Caravane, Gaillac, sept.-okt. Kun aldone „L'Espérantisme“.

Sentia Ujsag, Senta, Jugoslavia, 24. 9. Longa art. pri Esp. A Noite, Rio de Janeiro, 1. 9. Pri fiore de Leipzig, traduko el Esp. Edelweiß, Klagenfurt, okt. Art. de kapl. J. Schmidt „Esp. la lingvo de l' estonteco“.

Revista del Ateneo, Jerez de la Frontera, sept. „Art. dulingva (hispan. kaj esp.) de Gaspar Nunez de Arce.“

1 000 000 fk. por 46,50 fk.

ĉetante 3 obligaciojn partoprenantajn ĉiujare 32 elirodojn de 235 grandaj premioj por entute 21 500 000 fk.

La 3 titoloj ĝuas kune procenton de 47,50 fk. kaj estas repageblaj je minimume 1 100 fk. kune. Procento kaj repago estas garantitaj de la belga ŝtato.

De la unua pago subskribanto estas sola posedanto de la titoloj, plenrajte partoprenas la elirodojn kaj ĝuas la procenton.

Kondiĉoj de subskribo: la pagoj estas 24 monat. de 46,50 fk. aŭ 8 trim. de 139,50 fk. 18 monat. de 60,00 fk. aŭ 6 trim. de 180,00 fk. 12 monat. de 86,00 fk. aŭ 4 trim. de 258,00 fk.

Subskribu sendante vian unuan pagon al
F. Bormans, Rubensheide 52, Capellen (Antv.), Belgujo.

La plej malmultekosta libro en Esperanto

Ĉiu devas nepre posedi la libron

Eŭropo ĉe la abismo
de **Francesco Nitti**
iama ministrara prezidanto itala

Esperanto-traduko
kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.
(Preskaŭ 200 paĝoj.)
Prezo 4 sv. fk.
Mendu tuj!

La libro al privatpersonoj okazos nur post antaŭa pago de la sumo de 4 sv. fk. plus sendkostoj de 25 centimoj po ekzemplero, pagebila en la valuto de la konkerna lando, transkalkulita je la kurso de la borsoj de Zürich (Revendistoj) turnu sin pro specialaj kondiĉoj al la eldonejo)

Skribajn mendojn adresu al:
Frankfurter Societäts-Druckerei
G. m. b. H.
Abtlg. Buchverlag - Frankfurt a. M.
Korespondo en Esperanto. —: Ilustritaj kartoj rifuzataj.

Novaj tempoj.

Gazeto de la esperantista instruistaro, propagandas novan pedagogion, perlaboran lernejon kaj peredukatan pacon. Petu specimenon de:

M. Goldberg, Leipzig-Co.
Klemmstr. 14.

Eldonejo „Esperantista Voĉo“
(posedanto: Salo Grenkamp Kornfeld)
Jasio (Pollando)

representanto por Polujo de firmao Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, Hungara Esperanto Instituto, Budapeŝto ktp.

Liveras ĉiujn esperantajn librojn. Al konstantaj mendantoj ni konsilas malfermon de konto ĉe ni.

Postulu prezaron!
Ni rekomendas inter aliaj:

Balucki, Ama bileto	0.25
Elski kaj Eska, Unuaj agordoj	0.50
Grenkamp, Krijoj de l' koro	0.25
" Penseroj, la kajero	0.25
" " Ila kajero	0.40
Kabe, Internacia krestomatiko	2.—
Mickiewicz, Sinjoro Tadeo	5.—
" Improvizacio de Konrad	0.25
Orzeszko, A. B. C.	0.25
Wyslouch, El la lando de ruinoj	0.50

Prezoj en svizaj frankoj.

Por la sendkostoj oni aldonu 10% de la pagota sumo, minimume sv. fk. 0.40.

Ni serĉas interrilatojn kun ĉiuj esperantaj libroj kaj volonte ilin reprezentos en Polujo.

Por efektiviĝo de naci-ekonomia kaj financ-sciencia problemo ni organizas en monato januaro 1925

Vojaĝon de studo kaj orientiĝo

al Egiptujo kaj speciale al la regiono de Sinajo. Tre grava afero por financistoj kaj firmaoj. Sinjoroj kaj sinjorinoj interesiĝantaj pri konkernaj detaloj senpage ricevas informojn de

G. Dubach, Bissone-Lugano, Svislando.

Novajo!

Nepenetrebla pelerino en la veŝtpoŝo.
(Pluvhauit-imitaĵo.)

Necesega por ĉiuj. - Mi serĉas agentojn en ĉiuj landoj. - 1 pelerino kontraŭ unu dol. de

Fritz Zyleit
Lyck i. Ostpr., Germanujo.

Ĉiu interesato
pri la japana movado kaj antaŭ ĉiu

Orientano devas
subteni la japanajn samideanojn kaj

nepre aboni al
La Revuo Orienta
Monata organo de la japana esperantistaro.
Jarabono 7 sv. fk.

Adreso:
Japana Esperanto Instituto,
Tokio, Uĝigome, Ŝin Ogaŭamaĉi III/14.

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO
12, Boulevard du Théâtre, Genève (Svislando)

CELO:
Disvastigi la uzadon de la helpingvo Esperanto.
Plifaciligii la ĉiuspecajn moralajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo.
Krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materialaj interesoj celas trans la limoj de ilia genta aŭ lingva teritorio.
Kreskigi inter siaj membroj forlikan senton de solidareco kaj disvolvigii ĉe ili la komprenon kaj eslimon por fremdaj popoloj.

SERVOJ:
Ĉiu membro ricevas membrokarton, jarlibron kun la adresaro de la Delegitoj kaj multaj informoj pri la movado; li rajtas uzi la helpojn de la Delegitoj, difinitajn laŭ la statutoj.

ALIGO:
La kotizo por membro estas 5 fk., por membro-abonanto 12,50 fk. svisa valoro. Rekomendinda estas la aligo kiel membro-abonanto, kiu ricevas la gazeton „Esperanto“ dum tuta jaro. Pro la kurzdiferenco speciala prezo por malbonvalutaj landoj.

Aperis tradukite de Henriko Seppik tri altnivelaj verkoj de estona plej bona novelisto

Friedbert Tuglas.

Novelaro:

Kvin noveloj. 175 paĝoj. Kun aŭtoro kaj artikolo de l' tradukinto pri la estona beletristiko. Fundamenta prezo: 3,5 sv. fk.

Noveloj:
En la fino de la mondo. 56 paĝoj. Prezo: 1 sv. fk.
Popi kaj Huhuu. 52 paĝoj. Prezo: 0,50 sv. fk.
Aria traduko. Bela eksterajo. Luksa papero. Plaĉa aranĝo.

Por sendkostoj aldonu: Latvoj kaj Litovoj 50% aliaj landoj 100%

Eldonejo M. Tamverk
Esperanto-fako.
Karja str. 5, Haapsalu, Estonio.

„Esperantista Junularo“

Organo de UEA-Junularo — bela por infana literaturo — internacia lernejo-servo. Abonprezo po numero 1/2 franko de letero por eksterlando (jare 8 n-oj).

Administracio: A. Neupert,
Wedellstr. 17 - Leipzig-Möckern, Germ.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto, okazantaĵoj gravaj esp. kunveno, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresokostoj po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezo de ok BT-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Anoncetoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkoto, ĝuas por propraj anoncetoj preferan prezon de kvin BT-numeroj. Germanoj pagas 2—mk., prefera prezo por postabonantoj 1,25 mk. Anoncetoj devas elveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

DANKON al ĉiuj, kiuj estas sendintaj gazetojn por ni ekspozicio! Esperanto-Societo Poissdam. [2]

TIU SAMIDEANO, kiu sendis al mi anglan revuon „Auckland Weekly News“, estas petata skribi sian adreson al mi, por ke mi povu respondi laŭ liaj deziroj. Sed ĉar la poŝtmarko estas steliita, bonvolu scigi min per rekomendita poŝto. Erich Tauth, Neulässig 1, Post Felhammer i. Schlesien, Germanujo. [2]

Korespondo kaj Interŝanĝo.
Partoprenintoj de komenca kurso post finstudo deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo per l' kaj k. il. Skribu al s-o Cuk Simoni, ko-nercisto, s-o Lec Suma, studento, s-o Dardo Suma, studento, s-o Loro Gjonej, studento, s-o Ernesto Koligil. Adresoj por ĉiuj urbo: Shkodër (Skutari), Albano. Sendu nur seriozajn aferojn. [2]

Mi deziras konstantan korespondadon, nur kun tiaj, kiaj scias Esperanton bone, escepte german-, franc- kaj anglalingvanajn. Preĉpe kun tiuj, kiuj estas interesataj pri religio, sporto kaj naturscienco. Mi kolektas poŝtmarkojn. Eric Carlén, Fack 698, Stockholm 1, Svedujo. [2]

S-o Władysław Zdaniewicz, poczta Wiel, kie Solesznicki ziemi Wileńskieje, Pollando deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. PK kaj L, ankaŭ interŝanĝi papermonon kaj PM, ĉiam respondos certe. [2]

Por 100—500 poŝtmarkoj de la tuta mondo, mi donas saman kvanton de mia lando. Por pli bonaj mi donas bosniajn, albansajn kaj montenegrajn pm. Mi ne akceptas pli multe ol 2 ekz. de sama speco. De germanaj mi bezonas nur koloniajn kaj plebscitajn. [2]

Rudolf Bresslauer, Daruvar, Jugoslavio, Eŭropo. [2]

100 diversajn poŝtmarkojn de la libera urbo Danzig laŭ dezire stampitajn aŭ nestampitajn kontraŭ 5 sv. fk. kaj prezo validas nur por 1 monato! Adalberi Noch, Danzig, Johannissgasse 67. [1]

20 novaj esperantistoj, 13—15 jaraĵ lernantoj en la kvinna klaso de la Beskova Lernejo, Stockholm, Svedujo, deziras korespondi kun alilandanoj kaj ŝanĝi gazetojn, pm., pk. il. k. c. Adreso: Rektor Sam Jansen, Stockholm, Svedujo. [1]

S-o Otto Brückner, Herbarstr. 5, Planitz (Sa.), Germanujo, deziras interŝanĝi PK il., L, gazetojn ktp. kun tuta mondo. [1]

Respondas nepre.

N. Muhatajev el Serpuhov (Moskva) salutas la gesamlandanojn tutmondajn: Eska, Elski, Bombo, Fajfanto, Ende, Ago, Kopytowska, Vojcehoviĉ; Richez (belgo), Molina kaj Iznardo (hispanoj), Kenig kaj ĉiujn aliajn gekorespondantojn. [1]

Grupo de gekursanoj volonte interŝanĝus PK il., fotoĝrafetojn, leterojn kun gefratoj de tuta mondo Ruslando, Serpuhov (Moskva gub.) al gvidanto de esp. kursoj N. Muhatajev por ĝermanoj. [1]

Vojaĝantoj en U. Ŝ. A.

uzu
dum via veturado

ĉiam la liniojn de la Pensilvania Fervoja Kompanio
la plej moderna fervoja sistemo de l' mondo.